

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 1 / 2015

BONAN

JARON

2015 !



Triafoje mi partoprenis la Novjaran Renkontiĝon, kiu okazis ĉi-jare en Bitburg. Sukceso kiel ĉiam por tiu pli-ol-familia kunveno !

La programo estis denove varia kaj plenplena. Kun kelkaj jam konataj kaj aprobataj programeroj kiel la Manlaboroj, la Piĵamaj rakontoj, la amuzega Improvizata teatro animata de Klaas Dijkstra, aŭ la ĵonglado ateliero de Klaus Rumrich.

Sed ankaŭ kelkaj novaĵoj kiel la interesaj «Piĵamaj rakontoj por plenkreskuloj».

Pro neĝo, kelkaj decidis okazigi neĝbatalon kaj konstruadon de neĝhomo.

Unu el la avantaĝoj de Bitburg estas la etosiga salono «Paradizo» je la tria etaĝo, kun sonĝeca dekoro kiu kreas trankvilan etoson.

Tie okazis la plej noktecaj programeroj : la senĉesaj luphomoj, la piĵamaj rakontoj por infanoj kaj eĉ la interesaj «piĵamaj rakontoj por plenkreskuloj» proponitaj de Jesper Jacobsen.



Unu el la gravaj ingrediencoj de mia propra amuzo dum NR estas tabloteniso : ekde multaj jaroj, mi kaj aliaj junuloj ĉiam freneze ludis tablotenison. Ĉi-jare, Cyrille Hurstel havis bonan ideon proponante turniron kiu kunigis 14 ludantojn, de diversaj aĝoj, niveloj, aŭ landoj. La venkon havis sen malfacilaĵoj Olivier Buisson. Feliĉe, ĉiuj partoprenintoj ricevis bonbonojn je la fino !

Mia kontribuo al la programo estis la origamio-ateliero, pri kiu mi sufiĉe ĝojas. Ni faldis cignojn, papiliojn, flugantajn birdojn kaj pandojn. La infanoj helpis unu la alian sed ĝenerale ege bone elturniĝis ! Tiuj faldaĵoj estis poste reuzataj dum la ateliero pri animacio-filmoj, organizata de Nikola kaj Martin Markarian.



Luphoma ludo en la «Paradizo».



Origamio-ateliero

K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 12 aŭ 18 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G Ĉ E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

JANUARO

Merkredo la 7a	18:30 - 20:00	Prelego : Marc Démonthy : «Fabiola», romano de Kard Wiseman (1863, sen rilato kun la ĵus forpasinta reĝino)
Lundo la 12a ĝis dimanĉo la 25a	13:00 17:00	Ekspozicio de dokumentoj pri Eugène Marin (paĝo 20)
Dimanĉo la 18a	17:00 - 19:00	Prelego : «La vivo de Gassy Marin» (paĝo 20)
Merkredo la 21a	18:30 - 20:00	Prelego : Marcel Delforge pri la «Famaj farmbienoj de Waterloo»

FEBRUARO

Merkredo la 4a	18:30 - 20:00	Prelego : Viaj redaktoroj (Loissanoj) pri « Berberaj trezoroj de la Sousa ebenaĵo »
Merkredo la 18a	18:30 - 20:00	Prelego : Bernard-Reĝis LARUE pri turisma temo
Sabato la 28a	13:00 - 19:00	TalenFestival en Loveno (www.talenfestival.be/eo.html)



Saluton Kara Legantaro !

Ĉi nova jaro komenciĝis tristege per [pafmortigo](#) de 17 personoj en Parizo el kiuj 5 karikaturistoj de la satira gazeto [Charlie Hebdo](#). Multaj Esperantistoj funebras, ne nur ĉar 2 el la famaj desegnistoj estis subskribintoj de la peticio *Esperanto au bac*. Ne, ĉefe ĉar liberaj homoj forpasis kruele pro siaj ideoj kaj bildoj. La frazo «*Je suis Charlie*» rapide iĝis simbolo nuntempa de la esprimlibereco.

Nepre, ni deziras ankaŭ paroli pri spektinda prelego (franclingve, bv legi p.20) kiu okazos post nelonge. Ĝi temas pri Gassy Marin: paca anarkisto, humanisto, antropologo, vojaĝanto kaj... Esperantisto kiu, dank'al Esperanto, atingis piede Japanion.

Ni atendos vin multnombrajn por malkovri tiun nekredablulon, kies ideoj estas ankoraŭ aktualaj.

**MI ESTAS
CHARLIE**

Krome, liaj spertoj malkovrogigos al ni novajn horizontojn.

Ni deziras al vi mirindan jaron 2015. Ni luktos por konkretigi niajn songojn... kaj ni lasos la malĝojon flugi !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org

Post Bonaero jen **Lillo** fariĝas la nova unujara ĉefurbo de Esperantujo!

Lille, capitale mondiale de l'espéranto en 2015 !



Enhavo

- Paĝo 2 : NR (1/2)
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 - 7 : Memestimo: Ĉu psikologia panaceo?
- Paĝo 8 - 9 : Festo 2014
- Paĝo 10 - 13 : Ciril kaj Roz, Vojaĝo per biciklo
- Paĝo 14 - 15 : Liba en Salu
- Paĝo 16 - 17 : *La Diplo'* : Ĉu ĉesigi la bezonon posedi ?
- Paĝo 19 : NR (2/2)
- Paĝo 20 : Gassy Marin

Memestimo: Ĉu psikologia panaceo ?



Povas aŭdiĝi kiel troigo aserti, ke bona memamo aŭ ĉiam plialtiĝanta memestimo estas la plej simila afero al psikologia panaceo, sed laŭ nia propra sperto kaj tiu de sennombraj mondfamaj psikologoj, memamo aŭ la bona kaj aŭtentika amo kiun oni povas kaj devus ĉiam senti al si mem ja estas la plej evidenta ŝlosilo de feliĉo kaj la plej mirinda kuracilo kontraŭ preskaŭ ĉiuj psikologiaj malsanoj.

Jes, ni parolas pri la bona memamo, ne pri la malbona. Amo al si mem estas nur bona se, krome, oni ankaŭ sincere amas ĉiujn aliajn kaj malamas neniun ajn. Se oni orgojlas kaj arogantas tiel, ke oni sentas sin supera al ĉiuj ajn kaj agas disdegne al siaj ĉirkaŭantoj, tion ni nomas malbona aŭ falsa memamo. Aroganteco, fieraĉo, malmolesteco, orgojlo, malhumileco kaj malestimo al aliaj estas ĝuste la plej oftaj maskoj de "falsa memamo". Ĉi-tio estas tute la malo de alta, konvena kaj saniga memestimo.

Ni ankaŭ ne konfuzu altan memestimon kun memfido, kompetenteco, memkoncepto aŭ memimago. Bedaŭrinde memestimo estas tro ofte miskomprenata eĉ de psikologoj mem. Vera kaj bona amo

al si mem estas tre profunda kaj bonefika sento.

Alte memestimi signifas akcepti sin mem tian, kia oni estas; senti al si mem la saman tenerecon, karesemon, atentan zorgon kaj dolĉan admiron sentatajn al siaj plejamatoj; sincere ĝoji pri sia ekzistado; paroli al si mem per dolĉaj kaj respektoplenaj vortoj; ami en la vera senco de la vorto siajn vivon, familion, nomon, aĝon, landon kaj ĉion ligitan al sia propra persono, kaj trakti sin mem kaj ĉiun korpoparton sian danke, milde, delikate, zorge, kaj respekte; deziri al si mem kaj al aliaj ĉion plej bonan.

Homoj kun alta memestimo estas facile rekoneblaj pro siaj afableco, respektemo, kapablo ami ĉiujn kaj ĉion, simpleco, senafektecio, emo kaj preto al bona servado, optimismo, entuziasmo, facila adaptiĝeblo al ĉio, ĝoja sinteno, trankvila mieno kaj facila ridetemo.

Aŭtentika feliĉo kaj la kapabloj ami kaj ricevi amon estas nepre ligitaj al bona memestimo. Tion, kion oni sentas al si mem, oni reflekte projekcias al siaj ĉirkaŭaĵo kaj ĉirkaŭantoj. Alta memestimo plibeligas la vivon, kaj male, memmalamo ĉion ege malbeligas.

Bone informitaj psikologoj, socialaj asistantoj kaj edukistoj scias, ke preskaŭ ĉiuj formoj de malfeliĉo, agresemo, deliktado, geedzaj konfliktoj kaj mabonkonduito ŝuldiĝas antaŭ ĉio al malalta memestimo aŭ memmalamo.

La granda plejmulto el ni emas pensi, ke nia memestimo estas sufiĉe alta kaj bona, sed fakte ni malamegas nin mem multe pli ol ni suspektas, tute senkonscie.

La fama kanada psikologo Jack H. MacQuaig iam asertis, ke se ekzistus mezurilo de memestimo kun skalo de nulo ĝis dek gradoj, ni povus konstati, ke preskaŭ neni en la mondo superas la trian gradon. Nur ĉar ni ĉiam estis kaj estas ĉirkaŭataj de neŭrasteniuloj, malfeliĉuloj kaj malbonkonduktantoj, la homaro al kutimiĝis pensi, ke malamo, malfeliĉo kaj malbonkoduto estas aferoj tute normalaj, sed la vere feliĉiga novaĵo estas ke tio ja estas ŝanĝebla kaj korektebla, almenaŭ ĉe ni mem.

Memmalamo estas subkonscia fenomeno, kiu povas esti rimarkata nur ĉe la personaj agoj: malŝato de nia persona bildo (kaj en speguloj kaj en fotoj), ofta emo koleri, ĉiama malkontento pri preskaŭ ĉio, pesimismo, facila ofendiĝemo, daŭra grumblemo, ofta plendado, kutima protestemo, riproĉemo, kverelemo, violentemo, enviemo, malemo pardoni, malamo al preskaŭ ĉiuj kaj ĉio, timemo, malĝoja sinteno, nekredemo pri la ekzisto de amo, akra sento de soleco; pensi, ke ĉiuj nin malŝatas aŭ malamas; mematakoj (fumado, drinkado, sinnarkotado, tromanĝado, meminsultado eĉ pro sensignifaj eraretoj, paroli malbone pri si mem, ktp).

Ekster ĉia dubo, la plej malbona manifestiĝo de memmalamo estas la ago aŭ eĉ la nura intenco mortigi sin mem. Tiuj kiuj fakte sin amas benas ĉiun sekundon de siaj vivoj.

Bedaŭrinde la homa memestimo ricevas siajn unuajn malaltigajn batojn jam en la infaneco.

Se patrino iel sentigas sian filineton malbela, la sendefenda knabino tion akceptos kiel fakton, nur ĉar panjo tion diris aŭ sugestis. Se la patro traktas sian fileton kiel stultulon, tia la sendefenda knabeto ekvidos sin mem ĉar li pensas, ke paĉjo ĉion scias.

Tiele, la sentoj de malfeliĉiga memmalamo estos por ĉiam seninterrompe kaj nerimarkate transdonataj de unu generacio al alia.

Do, estas ni, kiuj tion nun komprenas, kiuj devas, por nia propra bono kaj tiu de niaj infanoj, nepoj kaj pranepoj, ion fari por interrompi tiun nedezirindan ĉenon, komencante per la plialtigado de nia propra memestimo.

Kiel ni komencu ĉion ŝanĝi kaj plibonigi? Necesas aparte granda kuraĝo por povi fakte ajnakoste eviti montri eĉ la plej etajn signojn de malalta memestimo, anstataŭigante ilin per la agmanieroj de memamantoj, laŭ la metodo de aktoro prepariĝanta por la ludado de nova rolo, sed valoregas la penon.

Do, ekde nun ni komencu agi kvazaŭ nia memestimo estus pli kaj pli alta, evitante agi kiel memmalamantoj, kaj ĉio fakte ŝanĝiĝados iom post iom: ni ĉesu tuj nin mistrakti kaj insulti.



Ni forigu pesimismon kaj mematakojn el niaj vivoj.

Ni ne plu plendadu, ni ne plu fumadu, ni ĉesu drinkadi kaj nin drogaĉadi, ni ne plu ofendu, envidu, malamu, riproĉu...ktp.

Krome, por ke feliĉo povu konkretiĝi ĉe ni, ni komprenu ankaŭ, ke ekzistas feliĉigaj pensoj kaj malfeliĉigaj pensoj, do ni nur enlasu la feliĉigajn en nian kapon.

Se vi pensas, ke viaj pensoj eniras en vian menson tute neregeble kvazaŭ liberaj muŝoj enflugantaj kaj elflugantaj tra malfermita fenestro, imitu la matematikiston, kiu sukcesis regi siajn suferigajn pensojn, manipulante ilin ankaŭ per papero kaj kraĵono kvazaŭ solvante matematikan problemon.

Li surpaperigis siajn donitaĵojn kaj surpapere kaj tute sensufere alvenis al bonaj konkludoj kaj decidoj.

Ekparolu al vi mem kiel eble plej ame kaj diru: De post hodiaŭ, mi benos mian vivon kaj senlime amos mian realaĵon.

De nun mi estos centoble pli komprenema kaj pardonema al mi mem pro miaj propraj homaj eraroj.

Ekde hodiaŭ per belaj pensoj, vortoj, sentoj, kaj agoj, mi pliagrabiligos miajn tagojn kaj tiujn de miaj familianoj, amikoj kaj...preterpasantoj.



Per miaj propraj sinteno kaj ekzemplo, de nun, mi instruos al aliaj, ke feliĉo komenciĝas ĉe feliĉigaj pensoj kaj amikeco estiĝas ĉe amika rideto.

De post ĉi-tiu momento, ni ĉiutage feliĉe agu kaj dividu nian feliĉon kun niaj kunestantoj.

De mateno ĝis vespero, ni multfoje ripetadu en nia eno jenan aserton:

«Mi tre amas mi mem tian, kia mi estas nun, kaj ankaŭ senescepte mi multe amas ĉiujn miajn ĉirkaŭantojn».

Ĉi post iom, ni rimarkos, ke nia sano pliboniĝas, ke amo fariĝas realaĵo, ke la mondo estas fakte multe pli bela ol ĝi ĉiam aspektis, ke la aliaj homoj kaj ni mem, kvazaŭ magie pliboniĝas, plilertiĝas kaj plibeliĝas, ke manĝaĵoj subite plibongustiĝas, malbonodoroj malaperas kaj ĉio mistere pliagrabiligas.

Ni malkovros tiam, ke ni ne vidas la mondon tian, kia ĝi estas, sed tian, kiaj ni estas.

Kaj fine ni ankaŭ konvinkiĝos ke homo kun alta memestimo estas feliĉa, feliĉiga, aminda, amiva, kaj amativa.



Verkis (kaj parolis, surrete):

Jorge Santos Morales

<https://soundcloud.com>



Ĉi-jare la tradicia muzika festivalo **FESTO** revenis al la sudo de Francio (Okcitanio) en Pont de Barret. La kadro estis belega, en arbara farmobieno transformita je skoltejo. La scenejo estis subĉiela kun la suno kaj steloj kiel plafono, centre de natura amfiteatro, kio ebligis havi bonajn sonon kaj vidon. FESTO estis aparta, ĉar restis neniu el la malnova organiza teamo, kaj la organizado ŝuldiĝas al la persista laboro de du aŭ tri personoj. Ankaŭ la arta programo estis aparta, pro veno de kelkaj artistoj kiuj malofte prezentas sin en Esperantio.

La 17an de aŭgusto, dimanĉe, post bonvenigo de la ĉefa kunordigantino Celine Bernard, la programo malfermiĝis per mallonga koncerto de JêLe. Sekve surscenejiĝis la repisto Platano kun Melono, kiu DJ-umis kaj por unu repaĵo pianludis. La vespero finiĝis kun Zhou-Mack Mafuila, kiu unue koncertis laŭ la muziko de sia disko *Originoj* kaj poste prenis gitaron kaj sin akompanis por siaj kantoj en la lingala, franca kaj Esperanto.



Lunde koncertis Patric per okcitana repertuaro el sia Esperanta albumo *Okcitanio*, akompanis lin lia gitaristo Steve. Poste la loka bando *Faranume* fajrigis la scenejon kaj la publikon per festeca ciganeca, balkaneca kaj mediteranea muziko en la lingvoj cigana, itala, hispana kaj aliaj. La publiko kaj la bandanoj tiom entuziasmiĝis, ke pro la pluvego la koncerto daŭris en la dancejo freneze ĝis la 2a nokte.



Marde pro sankialoj la trupon *Flankenpaŝo* anstataŭis *Inicialoj dc* kun nekutime trankvila kaj akustika pop-stilo. Tiu prezento dolĉigis la etoson kaj preparis ĝin por la koncerto de Jim Petit. Li premiere aperis en Esperanta aranĝo en Francio kaj proponis saporan kaj ŝveban substelan koncerton, miksante nekutimajn sonojn el sledgitaroj, flugante inter mondmuzika kaj progresiva stiloj. Unuafoje li publike ludis sian simfonion, kiu aperos en lia baldaŭa albumo *Karma*. Petit estas unu el la specialaj artistoj, kiaj *Rêverie* kaj *Ŝanĝo*, laŭ la profesia nivelo kun tre ellaborita muziko, kiu instigas la intelekton, la sentojn kaj la emociojn.

Notindas, ke FESTO gastigis Grundtvig-trejnseminarium. Dum la tuta mardo Kristin Tytgat trejnus pri la temo "Interkultura komunikado". Merkrede matene Floréal Martorell trejnus pri "Spektaklo-organizado", kaj posttagmeze okazis trejnado pri "Sontekniko" sub la gvido de Melono (Mélaine Desnos), kun praktika parto en la reĝisorejo kaj sur la scenejo. Ĉe la fino de la trejnado ekpluvis, kaj la praktika trejnado transformiĝis je translokado de la sonsistemo kaj lumoj en la dancejon por prepariĝo al la sonprovoj por la vesperaj koncertoj. Tio ankaŭ estis bona praktika ekzercado, ĉar porti kestojn kaj kablojn estas grava parto de la laboro en la teknika organizado de spektakloj.



La pluvo iom ĥaosigis la sonprovojn, sed finfine la teknikistoj kaj muzikistoj elturniĝis, kaj ĝustatempe komenciĝis koncerto de Morice Benin, kiu maloftege kantas en Esperantujo. Benin prezentis repertuaron de siaj kantoj en Esperanto kaj en la franca en tre intima kaj emociplena etoso. Postkoncerte esperantistoj sieĝis lin por akiri liajn diskojn, kiujn Benin aŭtografe dediĉis en la apuda diskoservo de *Vinilkosmo*, dum prepariĝis la scenejo por Lou Davi en Dub. Tute alistile li kantis laŭ ritmoj de regedobo kaj hiphopo en la okcitana kaj la franca, sed tre amuze ankaŭ en Esperanto kun helpo de la Esperanta publiko, kvazaŭ establiĝus dialoga interŝanĝo inter la artisto kaj la publiko.

Ĵaŭde denove belveteris; matene ekis la tria parto de la trejnseminario kun Cyrille Hurstel pri hommastrumado kaj manaĝado de volontulaj teamoj, dum granda parto de la partoprenantaro ekskursis (kiuj ne trejniĝis). La ĵaŭdan koncertvesperon komencis plena prezento de ĴeLe, kiu konsistas el Ĵenja (gitaro, ukulelo, violono, metalofono, voĉo) kaj Lena (piano, gitaro, voĉo), kaj la gastmuzikisto Kriĉjo (perkutiloj, voĉo). Ili ludis siajn proprajn kanzonojn kaj tradukitajn popolkantojn.

Sekve oni transiris al tute alia mondo kun la pola bando *Krio de Morto*, kiu per blua lumo-fumo malheligis la scenejon kaj metaligis la etoson per vigla kaj potenca sono. En la blumallumo videbliĝis la korpoj kaj vizaĝoj farbitaj per fluoreskaj koloroj de la bandanoj skuiĝantaj laŭ la gitaraj, basaj kaj drummaŝinaj pezegaj ritmobatoj kvazaŭ frapegoj. Post la unua metal-hardkora parto *Krio de Morto* planis daŭrigi en sia nova elektronik-kluba industrimetala stilo, sed pro teknikaj problemoj tio ne eblis, kaj la bando post la unua kanzono, dum la ĉeestantaro ne rimarkis la problemon, ludis kaj reludis siajn kantojn el la albumo *Martoria*; kelkaj el ili aperos en la *Metala Kompilo* preparata de *Vinilkosmo*.

Ĉi-jara FESTO estis kvazaŭ kaŝludo kun la suno kaj la pluvo. Por vendredo, la lasta tago, oni prognozis pluvon, kaj ĉiuj rekunvenis en la dancejo por la internacia vespero: pianoĵaza koncerto de Melono, familia koruso de Jorgos, muzika violonkvizo de Fransoazo Noiro kaj ŝercprogramo de Kevin.

En 2015 FESTO ne okazos, ĉar JEFO kaj EUROKKA laboros en Lille por la 100a UK kaj ties junulara programo. Do la venonta FESTO estos en 2016.

Festraportis Flo!

<http://sezonoj.ru/2014/10/festo-3/>

La Ondo de Esperanto, 2014, №10

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'




Irano

5/7 -> 28/8/2009 - 2000 km (8842 km)

▷ Ni longe hezitis antaŭ ol aliri tiun landon, ĉar ĵus misokazis prezidentaj balotoj kaj manifestacioj estas perfortege ĉesigataj en la ĉefurbo. Ĉiuj niaj amikoj forte konsiladas, ke ni ne iru tien. Antaŭ ol firme decidi, ni informiĝas ĉe tehranaj esperantistoj. Ili asertas ke ne plu estas danĝero. Ni ja ne estas aventuremaj kaj malprudentaj riskemuloj aŭ senkonsciaj pri danĝero, tute male. Kaj ni scias, ke amaskomunikiloj influas ĉies opinion. Ili plenumas sian taskon tie, kie okazas konflikto aŭ problemo, tio ne signifas, ke la tuta teritorio fajras kaj sangumas.

Ni facile eniras Iranon, post registrado de niaj fingrospuroj kaj kontrolo de niaj identigiloj. La tuto daŭras nur tridek minutojn. Tute ne samas por plurcentoj da irananoj atendantaj eble de pluraj tagoj sur tapiŝoj ĉe la doganejo. Ni denove ŝanĝas je horzono, 2h30 pli ol en Francio, kaj ni plijuniĝas je pluraj jarcentoj ĉar ni estas en la kvara monato de la jaro 1388 ekde la dato kiam Mahometo fuĝis de Mekko por iri al Medino. La tiea kalendaro pli logikas, ĝi komenciĝas printempe, kiam vekiĝas flaŭro kaj faŭno, kaj ĝi finiĝas vintre, kiam ĉio velkas.

Nova lando, novaj kutimoj, nova lingvo kaj nova mono... En Maku ni ŝanĝas 50 eŭrojn kaj ni ricevas dikan biletaron je 10000 rialoj... ĉirkaŭ 740000 entute. Ni sentas nin riĉaj sed kiam ni rigardas la prezojn en la urbo... ni nenion povas aĉeti. Kulpas la ciferoj en la persa, tute malsamaj al niaj hindaj ciferoj trandonitaj de la araboj. Ni eklernas ilin survoje per legado de la rapideclimaj ŝildoj montrantaj ambaŭ versiojn.



Sed ne finiĝis la malfacilaĵoj. Ni akiris rialojn sed la valuto uzata en la ĉiutaga lingvo estas tomano, kiu ne konkrete ekzistas. Por ĉiu aĉeto, ni do devas demandi pri la prezo en la angla, la vendisto ofte respondas en sia lingvo; ni komprenigas al li, ke li skribu la pagendan sumon, kion li faras en tomanoj. Ni konvertas la tomanojn en rialojn, sekve ni provas diferenciigi la monbiletojn de 500 (ĉirkaŭ 0,15 eŭrocendoj) ĝis 100000 rialoj. Ankaŭ ekzistas ĉies ĉekoj je 1000000 (unu miliono da) rialoj uzeblaj kiel ordinaraĵoj biletoj.

Sed ne tie finiĝas la afero. Post kiam ni finfine trovis nutraĵvendejon, ĉar vendejoj kvazaŭ ne ekzistas, ĉiam eniras iu en la butikon, ne por aĉeti sed ja nur por rigardi nin, aŭ por angle demandi, ĉu ili povus helpi nin... Ilia kapablo en la angla ofte tre malaltas kaj ili ne komprenas la respondon. Ni fakte ofte uzas bazan gestolingvon. Kaj ni devis memlerni ĉiujn fundamentajn vortojn.

En Maku, post la landlimo, restas 838 km por bicikli antaŭ ol atingi Tehranon, la ĉefurbon. Komence, ni spertas trairadon de dezerto, en la plej baza senco. La temperaturo najbaras 50° en la suno kaj ne videblas ombrero en tiuj grandaj dezertaj ebenaĵoj. Tamen, post proksimume ĉiu deka kilometro troveblas arteza puto, kiu ebligas al ni malvarmiĝi kaj plenigi niajn akvo-botelojn.



En fina kalkulo, la devo kaŝi niajn brakojn kaj gambojn malebligas malhidratigon kaj protektas nin de la varmeco. Koncerne la vualon, iuj diris al ni, ke parto de irananoj ne deziras, ke eksterlandanoj provu simili al ili, ĉar ili ne havas alian elekton ol porti ĝin. Rose konservas sian kaskedon kun tuko sur la nuko, inkluzive en la tre religiema urbo Qom. Cirilo solidarece decidas porti identan vestaron, kvankam viroj rajtas porti ĉemizetojn sed ne ŝortojn.



En la tehrana metreo virinoj disponas je vagonoj nur por si sed ili rajtas enriri en iun ajn, ne la viroj. Naĝejoj estas apartigitaj kaj ekzistas altpalisaraj parkoj en kiujn nur virinoj rajtas enriri, kio rajtigas al ili demeti sian vualon.



Kiam ni atingas la ĉefurbon ni devas enŝoviĝi inter la aŭtoj, la motorcikloj kaj la piedirantoj, kiuj ĉiuj moviĝas en ĉiujn

direktojn samtempe. Motorciklojn kondukas nur viroj kaj ili ofte veturas kontraŭdirekte aŭ sur trotuaroj. Ofte sidas tri aŭ kvar personoj sur motorciklo, memkopreneble sen kasko! La trafiklumoj utilas nur kiel ornamaĵoj.

La plej grandan malfacilaĵon ni spertas kiam ni volas piede transiri straton. Ni ofte atendas por gluiĝi al alia piediranto ŝoviĝanta inter la aŭtoj, kiuj neniam haltiĝas kaj pasas je nur kelkaj centimetroj for.

Jen iu el la multnombraj paradoksoj de tiu lando. La irananoj dolĉanimas kiel ŝafoj kaj tre helpemas, sed en veturilo ili fariĝas tigro alĵetiĝanta al ĉio pasanta kaj malbridiĝas per hupado.

Preskaŭ ĉiuvespere ni estas spontane kaj senpage gastigataj kaj nutrataj ĉie, kie ni haltas, foje eĉ dum unu semajno.



La iranaj apartamentoj tre grandas, pro la simpla motivo ke ofte ne enestas lito nek tablo nek seĝoj, nur grandegaj tapiŝoj kovrantaj la tutan ĉambron kun kusenoj ĉirkaŭe.

Foje estas brakseĝoj kaj sofoj. Same kiel en Turkio oni senŝuiĝas je la eniro kaj oni paŝas nudpiede, escepte en la turkeca necesejo kie atendas onin grandaj plastaj pantofloj.

Kiam venas la manĝotempo oni malfaldas tukon el plasto, en kiu kuŝas platpanoj, sur iun el la grandaj tapiŝoj en la hejmo aŭ en la korto. Oni manĝas per kulero kaj oni tranĉas per forketo, oni ne uzas tranĉilon. La deserto konsistas el sezonaj fruktoj, melonoj, bananoj, vinberoj, pomoj aŭ kukumoj akompanataj de salo. La iranaj fruktoj ne estas maturaj, irananoj ŝatas ĉion forte vinagritan kaj acidan. Por kompensi la acidecon ili trinkas duĝ, tio estas salitan jogurton kun gasa akvo.



En Esfahano, ni frandas glaciaĵojn je roza aŭ safrana gusto... Pri teo, oni enbuŝigas sukeron kaj oni sekve trinkas. Kiam finiĝis la manĝo, oni viŝas la plaston tikon kaj oni refaldas ĝin kun la pano ene. Poste, siesto ĝis la 17a horo kaj familia promeno en parko.

Surstrate ni paŝas en neniun hundan fekaĵon pro la simpla fakto ke ni neniam vidas hundon en la urboj. Ekde Turkio ni tamen vidas multajn ekster la urboj, trafikviktimojn vojflanke kuŝantajn en pli-malpli putra stato. Ni foje vidas ĝis po kvar tage.

Post Tehrano, ni opiniis la dezerton finita, kia eraro! Temis nur pri la komenco, sed nun tute ne plu troveblas akvopunktoj. Tiam helpas la ŝarĝveturilaj ŝoforoj haltigante nin por provizi nin per boteloj da

glacia akvo. Neniu ombro kie halti por tagmanĝi. Ni iam devis ŝirmiĝi sub ponto superanta la vojon, ĉar estis nenia ombreto jam de dekoj da kilometroj.

Polvo jam de longe kroĉiĝis al niaj vestoj, nia gorĝo sekas, niaj lipoj senĉese senhaŭtiĝas. Eĉ ne unu pluvtago de du monatoj, ni trafis nur unu dezerto-tempeston. En la malproksimo ni vidis blankan polvospuron vertikalan kaj, post momentetoj, polvonebulo kovris ĉion, flugis kaj kroĉiĝis dornarbustoj al niaj radoj, kaj post minutetoj jam forvaporigis la tempesto.



En Qom, tre religiema urbo, ni vidas la domon de Ĥomejni nur de ekstere kaŭze de siesto-tempo ĝis la 16-a horo.

Kelkajn fotojn de la moskeo en kiun ni ne rajtas eniri sen oficiala permeso de la religiaj instancoj kaj ni pluiras al Esfahano. Ni pasas je kvindek kilometroj for de Neauphle le Château, ne la franca urbeto kie loĝis Ĥomejni antaŭ sia potencopreno, sed ja samnoma vilaĝo en Irano. Fakte, la franca ambasadejo en Tehrano staras ĉe avenuo Nofel Loshato. Ĉe tia ortografio ni senrimarke preterpasis ĝin...

Esfahano, poste, montriĝas kiel muzeo-urbo pro sia arkitekturo kaj siaj multnombraj palacoj. Ni poste vizitas al Pasargard (tombejo de Kiro, aŭ Kuroŝ en la persa, la unua persa reĝo), sekve al Aghsh-e-Rostam kaj Persepoliso, belega antikva urbo ruina.

Fine Ŝirazo, kie ni vizitas al Baghe Eram, palaco de la irana Ŝaho, kaj al Hafeziyeh, palaco kie kuŝas la tombejo de la fama irana poeto Hafez, same fama kiel Ferdosi. Sed ankaŭ al Karim Khane Zand, alia palaco kies banejoj vidindas.

Fine, ni ne maltrafis frandi la lokan dolĉaĵon, faludeh. Temas pri glaciaĵo simila al blankaj vermiĉeloj faritaj per amelo, akvo kaj siropo de verda citrono.

Pro malsukceso akiri vizon al Pakistano, de Ŝirazo ni enavialidiĝas al Novdelhio, en Barato, tra Barejno. Nia flugtapiŝo ekpaneis kaj la feo en la lampo de Aladino estis enkarcerigita, kiel multaj irananoj kontraŭantaj la potencon. Tiel finiĝas nia fabelo je mil unu noktoj, kvankam iom for de Bagdado, en magia lando preta por eksplodi ajna-momente.

(daŭrigota)



La 22-a Internacia Eo-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Salou (4-11.10.2014)



Komence de oktobro la urbo Salou situanta proksime de Tarragono en Hispanio gastigis la kvaran fojon Internacian E-Semajnon. Jam de kelkaj jaroj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superas 140. Ĉi-foje ili venis el dekdu landoj. Alloga loko ĉe la maro altiras geesperantistojn por komuna unusemajna restado en bona etoso. Multaj jam konas unu la alian, sed ĉiam aperas novuloj, kiuj bone integriĝas al la grupo de fideluloj. La plej aĝaj estis la geedza paro el Katalunio: Trini García 97-jaraĝa kaj Joseph Colom baldaŭ 100-jaraĝa! Al ili estis ĉi-jare aljuĝita la premio “Ada Sikorska Fighiera” pro ilia meritplena laboro por Esperanto.

En la solena inaŭguro ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Salou s-ro Pere Granados Carillo. Li prezentis al ni la urbon el la vidpunkto de turismo, substrekis gravecon de Esperanto kaj deziris al ni sukcesplenan restadon kaj fruktodonan laboron. Poste okazis komuna fotado.

Dum la Semajno okazis E-kursoj. Progresantojn gvidis la sperta instruantino Rodica Todor el Rumanio. Ĉi-foje ŝi proponis tre interesan temon: “Esperanto - Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio”. Ŝi klarigis FLAM-analizon, laŭ kiu ni poste en grupoj diskutis kaj faris konkludojn. FLAM temas pri: Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj. Pluraj partoprenantoj en tiuj diskutoj rakontis pri siaj spertoj rilate la instruadon, redaktadon de lokaj bultenoj aŭ organizadon de diversaj aranĝoj kaj staĝoj. Ili dividis siajn



sciojn kaj spertojn kun aliaj.

Pri komencantoj okupiĝis Thierry Saladin. Li ankaŭ prezentis prelegon kaj klarigis pri la internacia peticio titolita “*Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio Tuj!*” iniciata de 16-jaraĝa junulo en februaro 2013. La deziro estas akcepti Esperanton TUJ! Tiucele estis fabrikitaj T-ĉemizoj, kiujn Thierry vendadis dum la aranĝo.

Gian Carlo Fighiera regalis nin per la verko de Alexander Puŝkin “La Neĝoŝtormo” kaj “La Damo de Piko”. Fine ni ĝuis la novelon “Palto” de Nikolaj Gogol.

Floreal Gabalda projekciis filmon el Nepalo pri la “Speciala Renkontiĝo”, okazinta tie ĉi-jare komence de marto. Ni partoprenis en ĝi. Multaj aprezis la filmon kaj demandoj pri niaj spertoj ne mankis.



Marcel Delforge parolis pri siaj vivspertoj kaj rakontis pri kelkaj el siaj multnombraj vojaĝoj en Esperantio ilustrante ilin per kelkaj bildoj.

Rafaela Urueña prezentis sian libron "Eŭropo paŝon post paŝo" el jura vidpunkto. Intereso pri kelkaj ekzempleroj kiujn ŝi kunportis estis granda kaj la stoko rapide elĉerpiĝis.

János Petik prezentis la temon "La disvastigo de Esperanto", sed antaŭe li parolis pri kelkaj gramatikaĵoj.

Vesperaj programeroj inkluzivis du interkonatiĝojn. María Ferigle Danti prezentis per DVD operon "IL TROVATORE". Ŝia edzo Luis Serrano Pérez animis du vesperajn debatojn: "Kiun influon havas nia movado en la socio?" kaj "Ĉu la Semajno bone funkciis?". Oni povas diri, ke "jes" malgraŭ kelkaj malglataĵoj. Luis ĉefe okupiĝis pri libroservo. Je dispono de la partoprenantoj estis ankaŭ fotoalbumoj.

La ĉeestantoj povis trarigardi ilin kaj ekmemori antaŭajn E-Semajnojn kaj aliajn E-eventojn. Unu el la plej atendataj kaj ŝatataj eventoj estas la folkloro vespero kun la ensemblo *Montjuic*, kiu ĉiam regalas nin per belaj havanaj kantoj instigaj al dancado. Tiuokaze ne mankas *Crema* - bongusta trinkaĵo el bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj.

Okazis unu tuttaga kaj du duontagaj ekskuroj. Pri la gvidado zorgis Rosa López kaj Antonio Martínez. Ni vizitis groton de Maravelles. Kuriozaĵo en tiu groto estas, ke el la plafono pendas kelkaj kalkaj formaĵoj kreskantaj ĉiudirekten.

Partoprenantoj de la alia duontaga ekskurso vizitis la urbon Tarragono.

Kelkaj profitis belan veteron por refreŝiĝo en la hotela naĝejo aŭ en la maro, aliaj promenis tra la urbo Salou, iuj vizitis la amuzparkon "Bona Aventuro".

Grupeto de piedirantoj promenis ĝis novkonstruita lumturo situanta ne tro malproksime de la *Cap Best Hotel*, en kiu ni loĝis. Survoje al ĝi Antoni Comellas atentigis nin pri kelkaj botanikaj plantoj kaj kompetente informis pri ili.



La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Amposta, kie ni enŝipiĝis kaj navigis sur la rivero Ebro ĝis la maro.

Koran dankon al la katalunaj samideanoj pro ilia fervora laboro kaj okazigo de tiu-ĉi plaĉa aŭtuna evento al kiu ni jam sopiras




venontjare.

Liba Gabalda

Ĉu ĉesigi la bezonon posedi ?

Kiam socio spertas amasan senlaborecon, „oni fajfas pri la rajto de la arboj” - jen la opinio de juna ĵurnalistino de *Inrocks* fine de la 1990-aj jaroj. Dek kvin jarojn poste, Jade Lindgaard [1] veturas tra la mondo por pritaksi la manierojn de alternativa vivo, la detruojn de la industrio aŭ de la atomteĥniko. Ŝi esprimas sin en sia propra nomo, por „mallerni” kaj „malprivatiĝi”, same kiel provas fari la loĝantoj de Nancio [2], kiuj renovigas kune siajn loĝejojn. La unua paŝo malfacilas. La dua povas ŝajni ridinda, tiom la vojo longas. Lindgaard vetas, ke la uzvaloro anstataŭos la interŝanĝvaloron, ke la abundo mortigos la proprieton : „*La certiĝo pri la aliro, kiam la uzado sentebblas, venkos la bezonon posedi*”, asertis la liberecana eseisto kaj ekologia aktivulo Murray Bookchin. Ofte optimisma, strange malkuraĝigita antaŭ ĉiuj siaj rubuoj aŭ siaj lumbrika kompoŝtejo, ŝi povas nur konstati la forton de la kutimoj : „*La malkongruo inter la ricevita informo kaj la adaptita konduto estas klara.*” Eric Dupin [3] vidis la bonan flankon de la radikala ekologio dum enketo, kiun li faris dum preskaŭ du jaroj



tra Francujo ĉe rektaj koncernatoj : gruploĝantoj aŭ alternativaj lernejoj. En dek du ĉapitroj li esploras la konturojn de tiu konstelacio de kulturebligistoj, kiuj trankvile ŝanĝas sian vivon.

Kvankam multaj projektoj de gruploĝado naskiĝas hodiaŭ, ili troviĝis jam profunde en la koro de pli malnova movado, en kiu oni retrovas la jurtojn de *Bussière-Boffy* aŭ la ekologiajn vilaĝojn de la departemento Altaj Alpoj.

La decido priloĝi la mondon regante sian ekologian spuron metas novajn demandojn kaj implicas novajn respondojn. En Italujo, la ekologia vilaĝo de *Torri Superior* [4] tiel praktikas la ekonomion de donaco. Same, labori laŭ aliaj valoroj ol tiuj de la kapitalisma ekonomio metas teruran defion : la ekzemploj de la pioniroj *Ambiance Bois* [Etoso ligno] (en la franca departemento *Creuse*) aŭ *Ardelaine* estas klarigaj. Fine, tiu provo metas demandon pri la ligo inter eksperimentaj retoj kaj la socia ŝanĝo.

Ĝuste al tiu demando respondas siamaniere eksterseria eldono de la magazino *Fluide Glacial* [5] konata pro sia

malica sinteno : „*Survoje al verda mondo*” eksplodigas ege efike la verdan kapitalismon en la devojigaj versioj de Pascal Fioretto kaj Renaldi.



Laŭ la verkisto François Meyronnis, konkurencito de la revuo *Ligne de risque* kun *De l'extermination considérée comme un des beaux arts* [Ekstermado konsiderata belarto] (Gallimard, Parizo, 2007), ni estas „*ĉiuj enpakitaj en la nevivblo*”. Nur, „*kiam ĉio estos perdita, ĉio estos savita*”. [6] Li ankaŭ ne metas pli da espero en la rekomendantojn de malkresko, kiuj aktivas por socio de abundo de simplaĵoj, ol en la transhomistojn, kiuj volas migri al aliaj steloj. Li preferas veti pri la ĝenerala disfalo, la fama „krea detruo” teoriigita de la ekonomikisto [Joseph Schumpeter](#) en la 1940-aj jaroj.

La sociologo Ramzig Keucheyan [7] memorigas, ke *media interkonsento* ne povas ekzisti kaj ke la sociaj kaj ekologiaj malegalecoj estas interligitaj. Eĉ pli : pro la novaj sociaj rilatoj truditaj de la verda kapitalismo suferas ree la malriĉuloj. Keucheyan analizas la geostrategion pri la klimato kaj la anstataŭigon de la malvarma milito per „*militoj verdaj*” : la aganta liberalismo ne ĉesas detruiri ion malnovan por regeneri sin ...

Kompreneble oni povas elekti la vivon en arbaroj, kara al Henry David Thoreau, nun laŭmoda, ĉar li rekomendis civilan malobeon. Sed, anstataŭ la arbaran malabundon, oni povus preferi la abundon de *Gargantua* de Rabelezo, kiu proponis tiun revon en mondo sen plasto nek atomteĥniko : „*Ilia tuta vivo estis regata ne de leĝoj, de statutoj aŭ de reguloj, sed de ilia volo kaj de ilia libera decido.*”

Christophe GOBY

[1] Jade Lindgaard, *Je crise climatique. La planète, ma chaudière et moi*, La Découverte, Parizo, 225 paĝoj, 2014, 18 eŭroj.

[2] Franca urbo, france *Nancy*. -vl

[3] Eric Dupin, *Les Défricheurs*, La Découverte, 2014, 260 paĝoj, 19,50 eŭroj.

[4] Vd Geraldina Colotti, „*En Italie, une autre économie*” [En Italujo, alia ekonomio], *Le Monde diplomatique*, oktobro 2012.

[5] *Fluide glacial série or*, n-ro 68, „*Vers un monde vert*”, Parizo, septembro 2014, 100 paĝoj, 5,90 eŭroj.

[6] François Meyronnis, *Proclamation sur la vraie crise mondiale* [Proklamo pri la vera monda krizo], *Les Liens qui libèrent*, Parizo, 2014, 108 paĝoj, 12 eŭroj.

[7] Ramzig Keucheyan, *La nature est un champ de bataille* [La naturo estas batalkampoj], La Découverte, 2014, 176 paĝoj, 16 eŭroj.



Mireille Grosjean: la Esperantisto de la jaro 2014




Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro.

Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj

sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013).

En ĉi tiu jaro 18 kandidatigantoj proponis 24 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis la voĉojn:



Mireille Grosjean 12 voĉoj

Stefan MacGill 7 voĉoj

Hori Jasuo 5 voĉoj

Heidi Goes 4 voĉoj

Kalle Kniivilä kaj Chuck Smith 3 voĉoj

unu kandidato ricevis du voĉojn, kvar kandidatoj ricevis po unu voĉon, 13 kandidatoj ne ricevis voĉojn.

La svisa emerita instruistino **Mireille Grosjean**, prezidantino de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas proklamita la Esperantisto de la jaro 2014 pro la sukcesa agado en Afriko, interalie pro la organizo de la 5a Afrika Esperanto-Kongreso; pro la aktiva laboro en ILEI, kies 47an internacian konferencon en Montevideo ŝi gvidis en julio 2014; kaj pro la preparado de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto okazonta en 2015.

En la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* aperos intervjuo kun Mireille Grosjean, kiun ni gratulas okaze de la laŭreatiĝo.



Halina Gorecka,
La Ondo de Esperanto

Gratulon, kara Mireille!

Novjara Renkontiĝo 2014-15

(daŭrigo de la paĝo 2)



Kelkaj verdaj skoltoj ĉeestis kaj ankaŭ iom reklamis pri la projekto kun prezentado kaj montrado de fotojn. Mi esperas ke la

ĝis-nuna sukceso de tiu ambicia projekto trafis la homojn !

Kaj unu el miaj plej ŝatitaj aferoj de tiu-ĉi NR estis la «sekreta renkontiĝo» kies celo estis okazigi surprizigajn, interesajn aŭ sensencajn grupajn agojn, ofte laŭ la ideo de «flash mob» : ni ekzemple frostiĝis samtempe dum la novjara dancado, aŭ organizis mistifikan prelegon pri «kiel elteni siajn gepatrojn».



Novjara festo

La renkontiĝo fermiĝis kun bonega adiaŭa vespero. Pri tio, ni devas multe danki Christoph kaj Klaas, kiuj havas verajn talentojn pri animado !



Mia opinio :

Mi ege ŝatas NR-n kaj ĝi estas sendube la renkontiĝo kie mi pasigis miajn plej bonajn momentojn en esperantujo. Pro miaj amikoj tie kompreneble, sed ne nur : ankaŭ pro la ege kreivaj programeroj, la nekredebla aĝdiverseco, la ludoj, la Paradizo-revejo, la muziko, la tablotenis, kaj la bonvena etoso.

Ĉi-jare, mi iom suferis pro la aĉega piano : tiom malbona sono ke mi preskaŭ ne emis ludi ĝin. Estas iom bedaŭrinde ĉar mi opinias ke la bonan pianomuzikan sonon ankaŭ partoprenas al la ĝenerala ĝojosento, ne nur mia propra !

Feliĉe, ĉeestis ankaŭ aliaj muzikistoj : i.a. la fama Kim kun sia akordeono, Pjotr kun gitaro, Stella kun fluto, Mara kun saksofono, Miro kun ĉelo, kaj tiel plu...



Avofrosto malfruis ĉi-jare...

Kiel tradicie, novjaro signifis bonkvalitan bufedon, tranoktan dancadon kaj piroteknikaĵojn ekstere.



De la 12a ĝis la 25a de Januaro

Dokumenta ekspozicio pri

Eugène «Gassy» Marin (1883 - 1969)

En 1905, en la kvartalo de Stokel' en Bruselo, ekis la aventuron de la paca anarkisto, antropologo vojaĝanta kaj disvolvisto de la internacia lingvo Esperanto, **Eugène Gaspard Marin**.


Prelego pri lia vivo

Dimanĉon la 18an de Januaro, je la 17a h,
ne maltrafu la **prelegon** (franclingve) pri tiu nekredebla samideano, far **Xavier Vanandruel**.

Espace des 4 Saisons

147, strato François Desmedt - 1150 Bruselo
Metrostacio STOKEL

prezo : 5€ (studentoj), 7€ (antaŭpage), 9€ (surloke)
rezervado per telefono : 0476 91 92 98



**La
tuta mondo iĝis
mia lando**

